

N-ro 4/2007
19a jaro (2a periodo)



Saluton al vi ĉiuj!

Sommeren er over og det meste er kommet i gjenge igjen.

I dette nummeret av *Inter ni dirite* får vi blant annet lese litt fra sommerens landsmøte og om resultatet av banneordkonkurransen – en meget vellykket sådan. Det er bare å lære seg ordet *erinaco* først som sist.

Judith



inter ni dirite

- LA JUNULARA FORUMO

Redaktas: Judith Parelie Abrahamsen

Landa kunveno de NJE 2007

La 16an de junio okazis landa kunveno de NJE (Norvega Junularo Esperantista). NJE kunsidis en Trondheim samtempe kun la landa kunveno de la plenkreska asocio.

Kunsidis en Trondheim kvar personoj, sed ankaŭ akompanis nin unu persono per Skajpo. La eksiĝanta prezidanto Signe Christophersen brile gvidis la kunsidon.

La jarraporto kaj jarkalkulo montris pozitive bildon de du aktivaj jaroj. En tiu periono, la membronomro multe kreskis, kaj NJE aranĝis plurajn renkontiĝojn kaj aktivecojn.

NOVA ESTRARO

Kaj Kai kaj Signe deziris eksiĝi el la estraro post multaj jaroj. Ankaŭ Aleksander danke rifuzis reelekton. Malgraŭ la malfacila elirpunkto, la elekta komisiono trovis bonajn kandidatojn.

La nova estraro konsistas el:

Prezidanto: Judith Parelie Abrahamsen

Vizprezidanto: Matias Jentoft

Sekretario: Einar E. Faanes

Estrarano: Kenneth S. Myklebust

Anstataŭanto: Oda Aase Johnsen

Arne Olav Mjøen reelektiĝis kiel revizoro, kaj Kristina Nygård estos lia anstataŭanto.

LA CELOJ DE NJE

Post la ĉefaj eroj en la jarkunvena programo,

okazis diskuto pri la celo de NJE. La diskuto kelkajn aspektojn lumigis. Ĉar NJE estas malgranda organizo, ĝia kapacito estas limigita. NJE ĉefe kaj nespecife difinite, devas esti forumo, kunvenloko, kaj aktivigilo por esperantlingvaj, junaj parolantoj kaj interesantoj.

FESTENO

Post la kunveno okazis la jubilea festeno de GET, la 100-jara esperantoklubo de Trondheim. Dum la vespero, ni inter alie kantis la himnon de NJE, «La vento».

jpa

La sakraj konkurso – rezultoj

En *Inter ni dirite 6/2006*, NJE invitis al konkurso ne pri sakrado sed pri sakraĵoj. La organizo volis pruvi ke malgraŭ la antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto la lingvo kapablas esprimi fiaĵojn.

La nomoj de la venkantoj publikiĝis dum la Landa kongreso de NEL/NJE en Trondheim meze de junio. La tuta, kaj ege leginda, verdikto de la ĵurio, ĉiuj ricevitaj kontribuoj, kaj video, troviĝas ĉe www.esperanto.no/nje/eo/konkurso.php

2A PREMIO

Serĉu vian kacon per pinĉilo!

ankaŭ kontribuis Etel Zavadlav, Kroatio – premiita per aldone du kompaktdiskoj de Vinilkosmo.

3A PREMIO

Vi estas pli delikata ol felo de fekaĵo!

kontribuis Manuel Pancorbo Castro, Hispanio.

Ni gratulas! Kaj fine mi volas citi ĵuriano Otto Prytz: «Kaj per tio, la diabla konkurso finiĝis!»

judith

1A PREMIO

Fiku fratindon de erinaco!

kontribuis Etel Zavadlav, Kroatio – premiita per kvin kompaktdiskoj de Vinilkosmo.



PONDUS

© Overli. distr. strandoverli@yahoo.com

nr 0 5



Naskiĝo de la Rustimuna Ŝtalarato de Harry Harrison (Sezonoj, 1996)

Kiam la protagonisto kaj ankaŭ rakontanto estas ŝtelisto kaj bankrabisto, ĉu vi kredas lian rakonton? Ĉu vi ankoraŭ kredas je rakonto lia kiam la rakontanto estas memĝustiganto kaj probable ankaŭ trompemulo kaj mensogemulo? Kaj ĉu li ankoraŭ estas laŭ vi heroo? Jen estas la situacio en 'Naskiĝo de la Rustimuna Ŝtalarato' de Harry Harrison.

La rakonto temas pri la kresko de Jim diGriz, la rustimuna ŝtalarato, kiu estas nek rato nek ŝtalo. Li estas knabo, planedano en alia mondo kaj alia tempo. Li tediĝegas kiel ido de farmistoj erinapraj kaj loĝanto de komunumo paceca kaj senokaza. Li volas vivi ekster la komunumo laŭ memkreitaj leĝoj, li volas krimuliĝi. Li nur bezonas iun por lin krimuliĝi. Do, por ekkoni aliajn pli spertajn krimulojn, li rabas bankon kaj kaptiĝas vole, esperante ke li trovos mastron kaj gvidanton en malliberejo.

Harry Harrison estas usonano kaj verkisto sciencfikcia, kaj ankaŭ Esperantisto. Li verkis multe da rakontetoj kaj libroj ekde la kvindekaj jaroj, la plej famaj estas la dekopa libraro pri Jim diGriz, la rustimuna ŝtalarato, kaj rakontetoj kiel 'Make Room! Make Room!'. En siaj skribaĵoj li diskutis multajn de la problemoj kaj baroj plej gravaj kiel popola denseco kaj fortuzo. Harrison estas Esperantisto longtempa, kaj Esperanto ofte ludas kelkajn rolojn en liaj rakontoj, ofte kiel

universala aŭ interplaneda lingvo, kaj estas trovita en loknomoj kaj similaj.

Ĉu nia kara Jimĉjo trovas kion li serĉas en la malliberejo? Ne, sed tiu fakto ne sciiĝas antaŭ tro malfrua tempo. Laŭ li ĉiuj malliberejoj estas stultuloj kaj ne povas iele aŭ aliele lin spertigi pri krimo, laŭ Jim, li jam estas pli sperta ol la plejmultaj kaptitoj. Sed en la malliberejo li aŭdas historion kaj rakontojn pri krimulo fama, sperta kaj neniam kaptita. Li nur konatas sub la kromnomo 'La Kuriero'. Jim volas krime spertiĝi laŭ la instruado de tiu mistera majstro. Li nur devas eskapi malliberejon kaj sian talentegon kriman montri al sia elektita instruonto. Pli facile pensita ol farita. Kiel trovi ulon kies identecon neniu konas kaj kiu ne volas troviĝi? Ekzistas solvo por tiu kiu povas pensi kiel krima majstrego kaj havas la saman egoon. Tion Jimĉjo havas.

La Naskiĝo de la Rustimuna Ŝtalarato estas unu el dek libroj pri Jim diGriz, la sesa eldonita, sed la unua en kronologia sekvo. Esperanto estas grava parto en tiuj libroj, tamen ĝi bedaŭrinde estas la sola tradukita al Esperanto (sed aliaj libroj de Harry Harrison estas tradukitaj). Se pliaj Esperantlingvaj libroj pri tiu krima majstra cerbumulo ekzistus, mi legus ilin. Ĝis tiu tempo mi devas ŝatiĝi per la anglalingvaj originaloj. Jim diGriz certe estas heroo laŭ mi, krima heroo aŭ mensoga heroo.

Einar Faanes

LA VIZAĜLIBRO ŝtorme kaptis la landon, kaj nun vi tie trovas grupon de kaj NJE (Norvega Junularo Esperantista) kaj NJET (Norvega Junularo Esperantista de Trondheim). Simple serĉu por «NJE» aŭ «NJET». Bonvenon!



— FINO DE *INTER NI DIRITE* —